

Annette von Droste-Hülshoff,

## Ĉe l' turo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Mi staras sur alta balkono de tur',  
Ekstere en ŝtorma bruado,  
Lasante tra mia hararo nur  
La venton samkiel menado:  
Ho, vi sovaĝulo freneza, mi  
Ja ĉirkaŭprenemas vin forte,  
Mi lukte emas batali kun vi  
Je vivo nun aŭ je-morte!

La ondojn mi vidas malsupre jen  
Samkiel ĉashundojn ludantajn,  
Akverojn mi vidas tie en  
Aeron brilante saltantajn.  
Ho, salti mi emas en tiun ĉi  
Malsekan furiozularon,  
Por ĉasi volus enplonĝi mi  
En la koralan arbaron!

Ŝipflagon mi vidas de tie ĉi,  
surmaste turniĝantan,  
La ŝipon tie observas mi  
Suronde jen turniĝantan.  
Ho, sidi mi emus volonte sur  
La ŝip', ekpreni la stirradon,  
Kaj super la rif' en rapida kur'  
Superi de l' maro surfadon.

...

Se estus mi ĉasisto ja.  
Nur pec' de soldato ia,  
Se estus mi viro almenaŭ, la  
Ĉiel' vere estus eĉ mia.  
Mi bonkondata infan' tie ĉi  
Nun sidas sekrete revante,  
Hararon mian malligas mi  
Envente ĝin flirti lasante!

*Traduko de la Germana poemo "Am Turme" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2006-06.*

*MR-448-1 / Arg-543-1090 (2013-01-31 16:21:43)*